# Kiam Stanislav Petrov savis la mondon


T. & M.: Krysztof Daletski, 2023




2. Ĉie estis protestantoj / multaj miloj sur la strat'
Kaj avertis pri la risko / de nuklea armilad'.
La regantoj mokis ilin, / ridis pri la angorem'.
Kiom protestantoj pravis / eĉ ne sciis ili mem
En la tago, kiam Stanislav Petrov savis la mondon.

3. Observante ĉiujn ilojn / Petrov vidis sur ekran'
La signalon, ke raketo / jam ekflugis de Montan'.
Restis unu kvaronhoro / ĝis anonco de l' alarm',
Malgraŭ pliaj kvar signaloj / taksis li je falsalarm'
En la tago, kiam Stanislav Petrov savis la mondon.

4. La horloĝa temp' proksimas / nun eĉ pli al noktomez'
Sed neniun ŝajnas ĝeni, / nek publika interes'.
Multaj serĉas eskaladon, / mokas pri diplomati'.
Ĉio ĉi min igas pensi / kaj demandi, kial ni




*Ĉi tiu verko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonda (CC-BY). Tio signifas, ke estas permesite prezenti, multobligi, disvastigi aŭ registri la verkon senpage.*